KIO ESTAS LA CE-SIGNADO?

Multaj produktoj, kiuj aperas sur la merkato en la Eŭropa Ekonomia Spaco, devas porti la CE-signadon. Unuavice tio koncernas teknikajn produktojn, kiel ekz. maŝinojn, protekt-ekipaĵojn sed ankaŭ ludilojn.

Per la CE-signado la produktinto konfirmas, ke la produkto plenumas certajn sekurecpostulojn minimumajn.

Absoluta sekureco – en la senco ke „nenio plu povos okazi“ - neniel estas atestata, sed nur sekureco, kiu dependas nelaste de teknikaj eblecoj kaj de ekonomiaj cirkonstancoj.

La minimumaj sekurec-postuloj estas regulitaj en leĝaj normoj por apartaj produkt-grupoj. Tiuj leĝaj normoj por produktoj kun la CE-signado bazas sur unuecaj direktivoj de la EU kaj egalas en la tuta Eŭropa Ekonomia Spaco. Ĉu el Irlando, ĉu el Cipro, la produkto devas esti samsekureca.

Kelkaj produktoj CE-signitaj estas uzataj ankaŭ ĉe la laboro. Ankaŭ por tiuj labor-rimedoj validas la normoj, do ili devas porti la CE-signadon:

- maŝinoj
- elektroaparatoj
- premtenujoj
- personaj protekt-ekipaĵoj
- medicinprodukto

LA DEVIGO DE PRODUKTANTO AŬ DE MERKAT-ENKONDUKANTO

La produktanto devas plenumi la leĝajn normojn pri produkt-sekureco. La sekurec-pruvo okazas en precize regulita procedo („procedo de la konformeco“). En multaj kazoj la produktanto rajtas atesti memstare la konformecon. Sed por tre danĝeraj produktoj, farantoj devas komisii eksterentreprenan institucion al speciala ekzameno („ekzameno pri konstruspecimeno“).

Ankaŭ se produkto portas la CE-signadon, la uzado povas esti danĝera. Precipe ĉe kelkaj prilabormaŝinoj ne ĉiuj danĝerlokoj eviteblas teknikrilate. Tamen la produktanto estas devigita, eviti laŭeble bone ĉi tiujn riskojn kaj atentigi pri restaj danĝeroj en la uzadinstrukcio.

Se la produktanto ne atingeblas, la merkat-enkondukanto havas la samajn devigojn. La sekurecpostuloj ankaŭ estas plenumendaj, se memfarita produkto nur disponas por propra uzo aŭ se produkto estas importita el lando ekster la Eŭropa Ekonomia Spaco.

Uzad-instrukcio

La leĝaj normoj pri produkt-sekureco devigas la faranton kunliveri uzad-instrukcion aŭ produkt-priskribon.

La minimuma enhavo de la uzad-instrukcio (ekz. por maŝino) respektive de la produkt-priskribo (ekz. por persona protekt-ekipaĵo) estas ankaŭ regulita en la koncerna normo.

DEVIGO DE LABORDONANTO

La uzad-instrukcio respektive la produkt-priskribo estas fundamenta parto de sekura uzado.

Labordonantoj devas principe zorgi pri la plenumado de uzad-instrukcioj.

Signifo de la CE-signo en la praktiko

La CE-signo ne estas kvalitsigelo, sed estas la indiko, ke produktanto efektivigas la minimumajn sekurec-postulojn.

Uzante CE-signitan laborilon la labordonanto povas fidi je la plenumo de sekurecaj kaj sanecaj postuloj ĝis kiam kontraŭa indiko ne montriĝas.

Se aperas duboj pri la sekureco de CE-signita labor-rimedo, ekz. ĉar okazis akcidento, la labordonanto devas ekzameni la aferon, ĉar homoj povus esti endanĝerigitaj. Antaŭ plua uzado la produktanto aŭ la merkat-enkondukanto estu konfrontita kun tio difekto por atingi riparon. Sed la respondeco por la plua uzo restas ĉe la labordonanto.

Se ne eblas korekti la difekton, tiam aliaj protekt-aranĝoj estu enkondukitaj aŭ la plua uzado estu malpermesita.

REKOMENDOJ POR NOVAĈETOJ

- Insistu pri la „sekureco“ de la produkto, ekz. per konforma formulado de la aĉetkontrakto.
- Ricevante produkton kontrolu la kompletecon, aparte la ĉeeston de protektiloj kaj de la uzad-instrukcio.
- Informiĝu pri sekura uzado ĉe la produktanto aŭ ĉe la merkat-enkondukanto.
- Antaŭ ekfunkciigi la novan produkton tralegu atente la uzad-instrukcion respektive la produkt-priskribon.
- Uzu la prudukton nur en la maniero difinita de la produktanto.
- Zorgu pri la realigo de la sekur-aranĝoj indikitaj de la produktanto.
- Informu kaj instruu la laborprenantojn pri la sekur-aranĝoj.
- Regule kontrolu la realigon de la sekur-aranĝoj.

LEĜAJ NORMOJ

Laborprotekto

§ 33 alineo 3 cifero 2 kaj § 70 alineo 1 cifero1 de la leĝo pri protekto por laborprenantoj, ArbeitnehmerInnenschutzgesetz - ASchG, originala leĝnumero 450/1994.

Minimumaj postuloj por kelkaj produktoj

Dekreto pri la sekureco de maŝinoj, Maschinen-Sicherheitsverordnung - MSV, originala leĝnumero 306/1994.

Dekreto pri personaj protekt-ekipaĵoj, PSA-Sicherheitsverordnung - PSASV, originala leĝnumero 596/1994.

Dekreto pri malalttensio-instrumentoj, Niederspannungsgeräteverordnung 1995 -NspGV 1995, originala leĝnumero 51/1995.

Dekreto pri simplaj premtenujoj, Einfache Druckbehälter-Verordnung, originala leĝnumero 388/1994.

Dekreto pri medicinprodukoj, Medizinproduktegesetz - MPG, originala leĝnumero 657/1996.

www.arbeitsinspektion.gv.at

Eldonanto: Federacia Ministerio por Ekonomio kaj Laboro,
Sekcio por Laborjuro kaj Laborinspektejo. Vieno, Aŭstrio.
Tradukita: Aŭstria Esperanto Federacio, ZVR 065398059.

Sen garantio pri kompleteco.
Vieno 2007

ARBEITS INSPEKTION

BUNDESMINISTERIUM für WIRTSCHAFT und ARBEIT

BMWA

MAŜINOJ, LABORILOJ

CE-signado

Signifo por la laborprotekto

CE

www.arbeitsinspektion.gv.at